

# JEN



—Ĉu vi scias, ke altranga persono donacas lambastonojn al la soldatoj, kiuj revenas sen kruroj?  
 —Malŝeliĝa mi! Kia malbona sorto! Jen taja Joĉjo, nur elperdis la brakojn!

NE ABONU ANKAŬ



# PAPITU'n

Kataluna satira karikatura gazeto.  
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jarkvarono. . . . . 2 Ptoj.  
Fremdlando: . . . . . 3 >

**PELAYO, 35 - BARCELONO**

**Neniu malbona esperantisto legas la**

## “FRANCA ESPERANTISTO,, 'n,

KIUN ONI ABONAS EN

**46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS**

# JEN

akceptas

# Poŝtmarkojn

de ĉiu nacio por la pago de l'abono

# UJEN

## La propagando de Sinjoro Privat

La vojaĝo de sinjoro Privat al Nordameriko estas plena de mirindaj okazintaĵoj. Ni devas konfesi, ke ili tute ne mirigus nordamerikanon, kiel sinjoron Reed ekzemple, pli kutimiĝintan al la neordinaraj aferoj de la nova Mondo. Sed ili multege mirigas nin, modestajn eŭropanojn, kiuj loĝas en urboj, kiuj konatiĝis kun la samtempanoj de Matusalemo. Ni nepre devas raporti pri ili.

Sinjoro Edmon Privat vojaĝis al Nord-Ameriko pro persona simpatio. Ja ni povas certigi, ke ili ambaŭ havas ion komunan. Ne nur ili ambaŭ estas junaj, sed ili estas ĉiam tielaj. Tiu eterna juneco alproksimigis ilin.

Kristoforo Kolumbo, filo el Genovo eltrovis la novan mondon por la Katolikaj Reĝoj; Edmon Privat, filo el Genevo eltrovis ĝin al la Esperantistaro. Ambaŭ faris la vojaĝon ŝipe. La simileco de ambaŭ herooj estas grandega. La kulpo

de la sola diferenco, kiu estas inter ili, ne apartenas al Privat sed al la epoko: kiam Kolumbo faris la unuan paŝon — kaj eĉ la duan — sur la Amerika lando, Chautauqua ankoraŭ ne ekzistis. Tial ni ne devas kulpigi Kolumbon, pro tio ke li ne faris tie propagandon pri Esperanto. Cetere, la pacemaj tieaj enlandanoj havis alian laboron pli gravan ol lerni kaj aŭdi pri internacia lingvo. Male, ni devas danki Kolumbon, ĉar lia silento pri nia lingvo kaŭzis alian similecon inter lia vojaĝo kaj tiu de Privat: ankaŭ kiam Edmon Privat alteriĝis, en Ameriko estis neniu esperantisto.

Sed tie estis inteligentaj homoj; kaj Universitato; kaj Chautauqua. Privat parolis, Ameriko aŭskultis; la juna Privat dissemis; la juna Ameriko rikoltis.

La amerikanoj ne estas personoj, kiel ni, kiuj konsentas aŭ povas perdi tri semajnojn por la lernado de lingvo; ili estas pli premegataj ol ni de laboro kaj agemo, kaj ili bezonas rapidecon eĉ por la ripozo. Tols-toj bezonis nur dudek minutojn por lerni Esperanton; ni bezonas iom pli, tute kiel amerikano, kun la diferenco, ke ni ne protestas kaj lernas, dum amerikano lernas ankaŭ sed protestas pro malrapideco. Ni latinoj protestus per krioj; la amerikanoj trankvile sin turnis al Privat kaj petis rapidigilon por la lernado de nia lingvo.



- De kiam vi lernas Esperanton?
- De hieraŭ.
- Montru al mi la poezion, kiun vi verkis.

Privat pripensis, intervidiĝis kun fabrikisto de maŝinoj, kaj el tiu intervidiĝo rezultis, ke post unu monato, oni povis lerni Esperanton en dek minutoj, — dek malpli ol Grafo Tols-toj — per la plejkomplikaj instrumentoj.

Ĉu tio ne estas miriga? Oni nun povas aĉeti en Nova-Yorko, per kelkaj dolaroj, revolveron, kiu injektas al vi ok-

dek naŭ sufiksojn po minuto (ripeta pafado), prempumpilon, kiu enpremas en vin la deksees regulojn en deksees sekundoj, postŝargeblan kanonon, kiu pafas en tri minutoj ĉiujn radikojn de la Fundamento en vian cerbon. Krom tio, en specialaj fabrikejoj estas maŝinigoj elektrikaj, kiuj por dek centoj, emprenas novan varbiton, senvestigas lin, lin distanĉras, skuas, pistas, kneras, amasigas, reskulptas, rekudras, revivigas, revestas, kaj redonas lin kun la kapo farsita per ĉiu simpla vorto kaj ĝiaj devenaĵoj.

Tamen, ho vel ili ne prosperis elpensi la maŝinon



- Ĉu vi ne intencas edziĝi?  
 —Ne sinjorino.  
 —Se ĉiu pensus kiel vi, la mondo ja finiĝus.  
 —Ne sinjorino.

por lernigi la akuzativon. Por ni eŭropanoj, la malfacileco de la akuzativo ne estas grava. Kiam ni ne povis lerni bone ĝin ni scias lerte kaŝi nian nesciecon. Tuse-to, raŭka sono, naza bruo je la finiĝo de vorto trompas bonege la aŭdanton; li ne scias ĉu ni estas malvarmumaj ĉu ni forgesis aŭ metis la akuzativon. Kiam ni dubas pri ĝia uzo skribante, ni faras, post la vorto, makuleton, pri kiu oni ne scias ĉu ĝi estas aŭ ne litero *n* ĉu ĝi estas aŭ ne nelerteco de nia skribmaniero.... Sed la amerikanoj ne plu skribas mane de post la elpenso de la skribmaŝinoj....! Kion, kiel fari?

La firmo Oliver solvis la problemon. Ĝi aldonis al siaj esperantaj skribmaŝinoj klavon, kiu alpresas tian makulsignon, ke la plej postulema kaligrafiisto povas nenion suspekti.

Ni jam mendis unu masinon.

Gloron al amiko Privat, al kiu ni ŝuldas tiom multajn progresojn!



STAS apartaj dioj por la infanoj, kiuj zorgas pri ili kun pli da amo ol la aliaj, kiuj zorgas pri la maturaj homoj.

Maljunulo glitas sur la trotuaro, kaj rompas al si kruron. Infano falas de kvina etaĝo,



—Estas mirinde, kiel viaj du filoj, Joĉjo kaj Peĉjo, similas unu la alian.  
—Ja jes; sed Peĉjo similas multe pli.

kag post tri horoj, ĝi ludas kun siaj kamaradoj. La dioj matracigis la trotuarojn por ĝi! Iliaj dioj donas al ili ankaŭ inteligentecon tian, ke multaj volus por si. La juĝo de infano estas ofte pli justa kaj ĝusta ol tiu de plenkreskulo.

Tial ni ne miras pri la jena okazintaĵo.

Tri infanoj ludis sur strato de Parizo. Unu el ili havis trumpedon, alia havis nenion, kaj la tria havis numeron de *L' Immonde Esperantiste*. La dioj zorgis pri ĉi tiu lasta. Matura homo infektiĝus per tiu papero; la infano ne; li ludis tute sendanĝere kaj sane.

Ili tediĝadis. Kion fari? Je kio ludi? Ili decidis ludi je aŭtomobiloj.

—Jes, jes, ni ludu je aŭtomobiloj, ni ludul —ekriis kunbruo kaj plaŭdante la tri knaboj.

Sed, kiel fari? kiel ludi je tiu ludo?

—Jen;—diris la posedanto de la trumpedo—mi kuros antaŭe, kaj mi trumpedos; mi estos la mekanikisto.

—Brave, brave! —konsentis la aliaj.


—Kaj, kion mi faros, mi? —demandis tiu, kiu posedis nenion.

—Vi? Vi kuros post mi —respondis la trumpedisto. Vi estos la sinjoro, la kliento.

—Brave; mi estos la kliento —diris kontentega la aludito.

Sed, mankis alia por okupi! Kion fari kun li? La tri infanoj konsiliĝis tre priokupitaj. Fine la pli granda trovis la solvon.

—Vi estos la haladzo. Vi kuros post ni svingante la numeron de *L' Immonde Esperantiste*.



### LA STATISTIKO

—Kiom da miloj da bifstekoj oni fritas en tiu ĉi momento?




—Mi petos konsilon de mia patro.

—Kial! Ĉu li petis la vian, kiam li edziĝis je via patrino?



### PRIVILEGIO

—Du tagojn sen manĝol... Mi ĉiam diris, ke la malriĉuloj estas pli fortikaj ol ni.



—Se mi ne faras tiun ĉi fojon pli bonan bilancon mi devos vendi la aŭtomobilon aŭ plimalaltigi la salajron al la teksistoj.



Hieraŭ mi vespermanĝis ĉe Ulo. Oni servis la manĝon en oraj manĝiloj.  
—Ĉu vere mia kara? Montru ilin...



#### MEMMORTIGO

—Ĉi vi scias naĝi?  
—Ne, sinjoro.  
—Do, kredu al mi; atendu la someron, ĉar nun neniu trapasas ĉi tie.



L nia kara majstro, kaj al ĉiuj honestaj samideanoj, JEN sendas siajn plejbonajn dezironjn en la okazo de la Nova Jarol

Al ĉiuj bonan farton, bonan sorton, kaj prosperon!

La direktoroj de JEN kaj kun ili la katalunaj artistoj, kies desegnaĵoj meritis kaj ricevis de la bongustemaj personoj sincerajn gratulojn, profitas la nunan jarkomenciĝon por montri al la samideanaro sian simpatian kaj fidelecon.

Januaroj sekvas januarojn, vintroj—vintrojn, Espereble, ni ĉiuj vidos multajn el ili. Bedaŭrinde, ne same okazos al JEN. La artistoj estas sangemaj, variemaj, kiel la vento, la vetero, la sezonoj, kiel ĉio en la mondo, escepte la abonantoj. Tiuj ĉi estas obstine kaŝigemaj. JEN havas nun ok mil abonintojn, sed ĝi bezonas almenaŭ dudek mil por havi prosperan vivon. Ni timas, ke tiun malgrandan kvanton da abonintoj, ni ne trovos, kaj ke sekve, JEN ne povos gratuli kaj saluti la esperantistaron ĉe la komenco de la 1911<sup>a</sup> jaro. Sed nur la tempo povos diri; ankoraŭ restas al ni kvar monatojn da vivo! Tamen ĝi profitas la okazon nun. Feliĉon al ĉiu!!

\*  
\*  
\*

En antaŭa numero, nia sprita karikaturisto *Apa* mokis hispanan mastrinon, kiu rimarkas ke la instruistino de siaj filinoj sin banas ĉiutage. *Apa*, ekkriigas ŝin. *Miaj filinoj, estas miaj filinoj, kaj tamen ili nur prenas banon ĉiumonate.*

Tiu amuza kritiko de la virta akvofobio de multaj geenlandanoj, indignigis du karajn samideaninojn de Barcelono, kiuj sendas al ni leteron postulante ke ni diru, kiel ekzemplon de la puremeco de la lando, ke ili, kvankam hispaninoj el Barcelono, sin banas ĉiujn du semajnojn.

Ni, kun ĝojo plenumas ilian postulon, kaj eĉ proponas al ili fariĝi redaktorinoj de JEN.

Nia kamarado *Apa* pardonos nin sed... ili estas pli delikate spritaj ol li mem. Efektive: du semajnoj sufiĉas por la intenco de la *karikaturato*.



KUNSIDO DE REDAKTOROJ DE «L'IMMONDE ESPERANTISTE».

- Ĉu vi estas certaj, ke la Esperanto, kiun ni uzas, estas klara?
- Jes, kial ne?
- Ĉar vane ni insultas ĉiujn. Neniu respondas nek pagas. Mi suspektas, ke oni ne komprenas nin.
- Mi timas, ke oni ne nin aŭskultas!





LA LACAJ

—Kiom naiva, mia edzino! Ŝi kredas, ke mi ne scias, ke ŝi trompas min!




—Kaj oni kuraĝos aserti, ke la kaplaboro ne svitigas!


## LA MORTPUNO TRA LA TEMPO KAJ TRA LA PROGRESADO




XII<sup>a</sup> JARCENTO  
La hakilo (15 minutojn).



XVI<sup>a</sup> JARCENTO  
La penaigilo (10 minutojn).




XVI<sup>a</sup> JARCENTO  
La sufoko (5 minutojn).



XVIII<sup>a</sup> JARCENTO  
La gilotino (1 minuton)



XIX<sup>a</sup> JARCENTO  
La ciktrizado (1 sekundon)



XX<sup>a</sup> JARCENTO  
La insista demandado (3 aŭ 4 tagojn proksimume).



—Ĉu eble ili estas bonaj por manĝi.

## NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro . . . 3 Fr. (1,200 sm.)  
 Jarduono . . . 2 » (0,800 sm.)

# JEN

Eldonisto: RAMON FARRÉ. str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEBANKO  
 ESPERANTISTA» Merton Abbey. LONDON SW.)

### REPREZENTANTOJ.


- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Ver'ag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Kiosko 77<sup>a</sup>, 10. Boulevard Capucines. PARIS

# FREMDA HUMORO

Unuigitaj Ŝtatoj N. A.

Karikaturoj de Birdoj

laŭ E. H. Aitken





Franca karikaturu elirita el la «Songes Drolatiques».



Flandra karikaturu.



GVLA

LA MANGEGEMO. Karikaturu el Brengel la maljuna.

LA FIRMO

HACHETTE KAJ K<sup>IO</sup>

79, Boulevard Saint - Germain

Paris

APERIGOS BALDAŬ

VORTARON

Esperanto Esperantan

DE KABE

NE AĈETU ĜIN ANTAŬ OL ĜI ESTOS APERINTA

ĈIUJ ESPERANTISTAJ GEJUNULOJ

ĈIUJ ESPERANTISTOJ DEZIRANTAJ CERTIGI LA ESTONTON DE ESPERANTO

DEVAS LEGI, ABONI, KONIGI LA GAZETON

JUNECO

Oficiale elektitan, ĉe la Barcelona Kongreso, kiel organon por la ĉiulandaj Esperantistaj gejunuloj

JUNECO publikigas propagandajn artikolojn, Kurson de Esperanto, literaturaĵojn plej bone redaktitajn Ĝi estas malfermita al la konkursojn.

KUNLABORADO DE ĈIUJ SIAJ ABONANTOJ

JUNECO estas la **Sola** Esperantista gazeto, kiu publikigas plenan Kronikon pri la tutmonda Esperanta movado ĉe la gejunuloj.



**Specimeno senpage ricevebla**

Jara Abono. . . . . 4 Fr.

Franclando. . . . . 5 Fr

Kune Kun «Franca Esperantisto». . . . . 6 Fr.

Administrejo: 152 B'-Raspail. — PARIS



—Donn al mi la kruvon, mi petasi!

LA KRISTNASKA MELIAGRO